# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-INSTITUTO

**Nr 49 oktobro 2003**
**Adreso: p/o Bardhyl Selimi Rr. Maliq Muço P.50 A.3 Tiranë Albanio**
**Telefonoj: +355 4 241272 (Vasil, prezidanto); +355 4 238 558; ++355 68 25 80 758 (Bardhyl , sekretario); +355 4 363360 (Rita , kasistino)**
**Rete:** pistolii@email.com (Vasil Pistoli); selimib@albmail.com (Bardhyl Selimi); adoci@gmx.de (Artur Doçi) ; shhasani@albmail.com (Shaban Hasani); hamotto@aul.com.al (Martha Otto) **;** beqirajs@hotmail.com (Saimir Beqiraj) ; matildasokoli@yahoo.com (Matilda Sokoli); a_myrazi@yahoo.com (Ariel Myrazi); sambeg2000@yahoo.com (Saimir Begollari); dpermeti@amc.al (Rita Përmeti); dorian77@hotmail.com (Dorian Kodra); mgumeni@lincoln.org.al (Jon Gumeni); hysaerald@yahoo.it (Erald Hysa); ereid@wp.pl (Ereid Dhimitri); dritanxhindole@hotmail.com (Dritan Xhindole)
**Retpag'o** : http://www.esperantio.tk

**La enhavo de tiu c'i numero**

**Interrilatoj AIS-AEI**
Raporto el AIS-sesio en Karlovo
Salutparolo de Ariel Myrazi
Baldau'a vizito de s-ro Boj'idar Leonov
Klerigado en Albanio post la jaro 1990
**Universala Kongreso 2003**
Raporto de Martha Otto
Raporto alternativa
Propono de Istvan Ertl
**Nia propagando por Esperanto**
Entrudig'o de la angla
Kial oni devus lerni Esperanton
Lingva demokratio au' lingva demagogio
**Novaj'oj**
Vizito de polaj samideaninoj
Forpaso de S-ro Tomasz Jan Kudrewitz
Senpaga komputada leksikono
La 16a Ekumena E-Kongreso en Rimino
Cirkulero de Transnacia Radikala partio
Elc'erpitaj'oj el "Heroldo Komunikas"
**Studado**
Internacia Turisma Agentejo "Esperatotur" informas
Diplomlaboraj'oj de niaj studentoj : "Albanoj en Eksjugoslavio" de Andi Berberi

**Humoraj'oj**
Elc'erpitaj'oj de SENNACIULO
kaj Israela Esperantisto , au'gusto 2003

**El nia tradicio**
Fragmento "Junag'o de Skanderbeg", el libro de Cuk Simoni pri nia nacia heroo "Gjergj Kastrioti-Skanderbeg".

**Nia financo**
Enspezoj kaj elspezoj g'is oktobro 2003

-----

**AIS kaj AEI**

**C'iuj niaj studentoj sukcesis![1]**

Lau' telefona raporto de Ereid Dhimitri, en la lasta sesio de AIS en Karlovo ( Bulgario) partoprenis ok albanaj studentoj, nome: Ariel Myrazi, Anri Subashi, Egli Brati, Ereid Dhimitri, Andi Berberi, Edi Pashaj, Enis Rada, Erjon Lato. Du el ili, Ereid kaj Ariel magistrig'is dum la aliaj bakalau'rig'is. Tio estas envere granda sukceso kaj g'ojo por ni c'iuj. Albanoj prezentis en la sesio interesajn diplomtemojn kiel ekz. "Muzeologio en Albanio", "Turismecaj potencialoj de la areo Vlore-Sarande", "Albanoj en Balkanio", "La kasteloj de Albanio", kc.
S-ro Boj'idar Leonov, rektoro de la urba universitato, montris sin tre afabla al albanoj, atendante ilin c'e la stacidomo kaj helpante por ties akomodig'o. La sesion partoprenis mem la prezidanto de AIS s-ro Helmar Frank, sekretario Hans Quednau, s-ino Alicja Lewanderska, s-ro Lobin, s-ro Andrzej Grzebowski, ka. Gratulojn al c'iuj!

**SALUTPAROLO**

Estimataj kaj honorindaj gesinjoroj estraranoj de Akademio Internacia de Sciencoj, de klerigejo de AIS en Budgoszcz, estimata s-ro Boj'idar Leonov, rektoro de Universitato de Karlovo, estimataj geamikoj kaj geastudentoj c'eestantaj!

Estas ja vera plezuro por mi kaj samtempe ia privilegio alparoli vin por danki kaj saluti okaze de la kuranta sesio de AIS. Por ni , albanaj gestudentoj, tio estas aparte granda evento, c'ar unuafoje prezentig'os kandidatoj por magistrig'i surkampe de turisma kaj internacia kulturo- kampoj.
Retrorigardante , mi povas diri ke kvankam la Esperanto-movado ekflorig'is ankau' en Albanio c'irkau' cent jarojn antau'e, nur post la jaro 1990 eblig'is plua vigla enlanda E-movado danke al la fondig'o de Albana Esperanto-Ligo kaj ties branc'oj kaj fakoj, interalie Albana Esperanto – Instituto, sekcio de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI). En la jaro 1997, kiu cetere estis por Albanio maloportuna pro detruig'o de la s'tato , sekve de la bankrotig'o de la tiel nomataj fifamaj lumonaj kompanioj, albanaj esperantistoj pripensis pri alia pas'o grava: edukig'o kaj klerig'o de kadroj esperantistaj kvalitaj kaj kapablaj per partoprenigo de ili al la Studumo de la eksa Monda Turisma Organizaj'o centre en Bydgoszcz de Pollando. C'irkau 15 gestudentoj alig'is somere 1997, c'e la Studumo kaj tiel al Bydgoszcz alvenis kontingentoj de albanoj po averag'e 15 gestudentoj jare .

[1] Lau' raporto fare de Internacia Esperantotur la stato estas iom alie. Vidu

La veron dirante , ne estis facile por ni albanoj log'i kaj studi en Pollando, ne nur pro klimataj diferencoj , vivmaniero, ktp. Ni pardonpetas al niaj profesoroj kaj edukistoj pro iuj niaj eraroj kaj kulpoj, kaj g'enoj al ili. Kelkaj el ni forlasis la studojn kaj trovis iun alian laboron en kaj ekster Albanio. Sed tiel okazas normale. Ne c'iuj atingas la fincelon!
Tamen, antau' du jaroj , bakalau'rig'is la unuaj el ili kaj lastjare kaj c'ijare bakalau'rig'os kelkaj aliaj. C'ijare ec' magistrig'os almenau' du bakalau'ritoj kio signigas multon por la albana movado de Esperantismo kaj pli vaste.
C'ikaze, ni esprimas nian elkoran dankemon al niaj profesoroj el la Studumo, nome al gesinjoroj Grzebowski, al la forpasinta honorinda s-ro Tomasz Jan Kudrewitz, s-ino Eva Bondar, s-ino Aleksandra Kowalczik, Zbigniew Galor, ka.
Same al profesoroj de AIS Helmar Frank, Hans Quednau, Lobin, Alicja Lewanderska, Eva Polakova, kaj nelaste al profesoro Boj'idar Leonov.
Sendube la bakalau'ritoj kaj magistritoj helpos notinde al la plialtig'o de E-instruado en Albanio kaj pliviglig'o de la movado mem.
Ni intencas starigi baldau' en Albanio filion de AIS malvaste kunlabore kun la bulgara filio estrata de s-ro Boj'idar kaj esperebIe ankau' en Tirana ni arang'os sesiojn de AIS!
Albanio reprezentas unu el la c'iam pli allogaj turismaj landoj de Mediteraneo kaj tie funkcias jam kelkaj mez- kaj altlernejoj kie centoj da gestudentoj trejnig'as pri turismo .
Konkludante mi ankorau'foje esprimas nian profundan estimon por vi c'iuj.
Dankon pro atento.
**Ariel Myrazi**
**(**salutparolo okaze de malfermo de sesio en Karlovo**)**
**Konfirmo de Andrzej Grzebowski**
Kara , Gratulon, ke Viaj ok studentoj kune kun niaj 35 polaj gestudentoj cxeestis en
Prov SUS en Bulgario. Entute magistrigxis 8, en tio 2 el Albanio, 2 el Rumanio kaj 4 el Pollando, kaj bakalaurigxis 11, en tio - 2 el Albanio kaj 9 el Pollando.La detalajn raportojn Vi certe ricevos de AIS Egzamen-komisiono. Bedaurinde la vizaj problemoj en Unuigxanta Europa Unio akrigxas, sed ni devas batali kontrau viza diskriminado, same kiel kontrau rasa, religia cxu seksa. Finigxis ankau nia 24 AKB-Sesio, pri kiu ni sendas apartan raporton, kiun cxeestis 3 studentoj el Albanio: Ulian Binazi ( I jaro), Florian Qemali ( II jaro) kaj Elton Zaimi ( III jaro).
AIS prenis jam decidojn, ke en 2004 jaro magistrigxi eblos dum 27 SUS en Komarno
komence de septembro kaj bakalaurigxi ankau dum 5 BUS en Bydgoszcz
(24-28.09.2004).
Dankante pro Via gxisnuna bona kunlaboro
Kore salutas
Regina kaj Andrzej Grzebowski

**----**

## KLERIGADO EN ALBANIO POST LA JARO 1990

La klerigado en la Albana komencig'is en la jaro 1887 per la malfermo de la unua albanlingva lernejo en la urbo de Korc'a (sudoriente de la lando), sed g'i akiris notindan disvastecon, nature, nur post la proklamig'o de sendependeco de Albanio, tio estas post 28a de novembro 1912. G'is tiutempe, la lando estis okupita de osmanoj kiuj kiel regule

ne permesis la albanan skribadon kaj legadon, sed nur lernejojn en la turka au' greka lingvoj. Dun la Unua Mondmilito, la au'straj au'toritatoj de okupacio donis valoran helpon per la malfermo de pli ol 200 albanalingvaj lernejoj, kompilado de programoj kaj trejnado de instruistoj. Oni povas konstati ke tiom da lernejoj estas malfermitaj proksimume dum la tuta dekkvin jara regado de la reg'o Zog la Unua. La porinstruista Mezlernejo de Elbasan (urbo centre de la lando), malfermita en la jaro 1909, pretigis la unuajn kadrojn de nia klerigado ne nur por Albanio mem, sed ankau' por aliaj albanaj regionoj en Balkanio (eksa Jugoslavio)
Sendube , pli amasa klerigado en Albanio estig'is dum la komunisma reg'imo, kiam oni malfermis elementajn lernejojn preskau' en c'iu vilag'o au' duopo da vilag'oj kaj mezlernejoj almenau' por c'iu municipa unuo. Krome, oni malfermis ankau' altlernejojn, el kiuj fondig'is en la jaro 1957 la unua albana universitato. Certe tion oni povas eksplikі per la bezono de la totalisma s'tato je kvalifikitaj laboristoj kaj specialistoj, same edukitaj civitanoj, en socio kie senlaboreco malc'eestis, samtiel por pretigi homojn kiuj komprenus kaj aplikus la oficialan propagandon kaj politikon de la partio-s'tato.
Tiel, je la komencig'o de la jaroj 90, en Albanio estis c'irkau' 900 000 gelernantoj kaj gestudentoj kiuj studis en 1828 elementaj lernejoj, 386 mezlernejoj kaj 11 universitatoj. Dume la log'antaro de Albanio ne superas 3 300 000 homoj. Entute studentoj estas c'irkau' 40 000 en ambau' eduksistemoj (c'eesta kaj malc'eesta) au' averag'e 120 studentoj por 10 000 log'antoj , cifero notinde pli malalta ec' kompare kun la najbaraj landoj.
La edukado kaj klerigado en la eksa totalisma s'tato havis siajn limigojn: unue, pro g'ia ideologia karaktero marksisma-leninisma g'i estis iel unuflanka kaj fermita; due, pro g'enerala izoliteco de lando fare de s'tata politiko, same limigitaj ekonomiaj eblecoj por certigi la necesan didaktikan kaj materian bazon. Kiel ajn, la jaroj 90 trovis Albanion kun vasta reto de lernejoj de diversaj niveloj kaj specoj formintaj tutajn klerajn generaciojn. La nivelo de pretigiteco de gejunuloj estis relative alta, kio pruvig'is kiam granda ties parto iris eksterlanden (en Eu'ropon au' Usonon) por plustudi.
La gradoj de la kleriga sistemo jenas: antau'lerneja klerigado (por infanoj 3-6 jaraj); elementa klerigado je du cikloj: malalta 6-10 jarauloj kaj alta 11-14 jaruloj; g'enerala mezlernejo kvar kaj kvinjara samkiel profesiaj mezlernejoj; altlernejo 3-6 jara.
La s'ang'ig'o de la politika sistemo je la komenco de la jaroj 90 certe influus ankau' nian klerigan sistemon. Jen sekvaj'oj: unue, la libera movig'ado de civitanoj enen kaj eksterlanden, antau'e ia tabuo, igis grandan parton de la instruistoj kaj profesoroj translokig'i en grandajn urbojn, c'efe en metropolojn. Tiel la areo Tirana-Durres (je 1 000 000 log'antoj) abundas aktuale je instruistoj, dum la kamparaj areoj malsatas je tiaj kadroj, aparte la mezlernejoj. Des pli, c'irkau' 50 % de instruistoj en la vilag'oj ne estas akirintaj la bezonatan kvalifikecon. Samtiel, pli ol 40 % de instruistoj en altlernejoj estas forlasintaj la patrion je serc'ado de pli bona vivo kaj pli alta pago , ec' ne en sia profesio.
Due, notinde malaltig'is la intereso por sekvi lernejojn , ne nur mezlernejojn kaj altlernejojn, sed ankau' devigitajn elementajn lernejojn kiujn jam forlasis multaj infanoj por vivteni sin kaj familion per laboro. Tion instigis kaj forte motivigis ankau' la fakto ke la plejmulto de la eksaj s'tataj entreprenoj estas fermitaj pro la ties malalta nivelo de teknologio, sekve ne profitdoneco. Antau'e, la gejunuloj finintaj studojn tuj dungig'is en tiuj entreprenoj. Dume la privataj nove fonditaj entreprenoj estas c'efe je karaktero de servoj au' malpeza kaj nutraj'a industrioj.

Ankau’ la subvenciaj’oj kaj investaj’oj fare de la s’tato por konstruoj, rekonstruoj, riparoj, ekipaj’oj kaj provizado estas reduktitaj je granda skalo. Tiel la laboratorioj de h’emio, fiziko, biologio, ktp apenau’ ekzistas ec’ en la c’efurbaj mezlernejoj , kaj instruistoj pluuzas kiel en antikveco nur la nigran tabulon kaj la kreton.. La hejtado dumvintre de plimulto de lernejoj ne ekzistas. Ankau’ la instruaj praktikoj ,tiom necesaj aparte por la profesiaj lernejoj estas notinde reduktitaj, c’ar mankas la grandaj entreprenoj kiuj antau’e certigis tion lau’planite. Falis ankau’ la intereso de instruistoj kiuj pagatas tre mizere (70-160 eu’roj monate por mezlernejoj kaj malpli ol 300 eu’roj por altlernejoj). Tio malpliigis  ege la frontan progreson de gelernantoj, aliflanke estas instiginte la koruptecon en la sino de instruistoj.

Tamen la tranzicia periodo kiu estas jam transirinte, antatau’ig’as de rekapabliga periodo ankau’ surkampe de edukado kaj klerigado. Helpe c’efe de fremdaj fondusoj kiel SOROS, GTZ de Germanio, KULTURKONTAKT de Au’strio, USAID de Usono ka, en la tuta lando oni entreprenis la rekonstruig’on kaj konstruig’on de novaj lernejoj modernaj, bone ekipitaj per necesaj didaktikaj kaj materiaj rimedoj. Oni faris de fojo al fojo trejnig’on de instruistoj per seminarioj diversaj ene kaj eksterlande; la s’tato estas motivigante la vilag’ajn instruistojn per pli altaj salajroj kaj senpaga transporto, novaj metodoj kaj enhavo eniris enlanden de okcidentaj lernejoj. Ekde pluraj jaroj oni enkondukis sistemon de profiligitaj g'eneralaj mezlernejoj je direkto matematika-naturscienca kaj beletra- filozofia. Miloj da abituerintoj c’iujare dau’rigas altajn lernejojn en Italio kaj aliajn okcidentajn landojn danke al la programo de ekzemple,  Itala Kultura Instituto, ks. Oni plibonigis ankau’ la sistemon de akcepto de studentoj en profesiajn lernejojn kaj universitatojn  enkondukante konkurson kaj aliajn efikajn formojn.

Oni arang’is plurajn pedagogiajn konferencojn pri diversaj problemoj de edukado kaj perfektigis la sistemon de trejnig’o kaj kvalifikig’o de instruistoj. Nature, la malfermiteco al la cetera mondo estas kontribuinte al gejunoloj akiri pli da informacio kaj pli da stabila asimilado de scioj fare de ili. C’iutage pliig’as la eblecoj de dungig’o en nove fonditaj entreprenoj, kune kur la restrukturig’o de nia ekonomio.

Tiel ekzemple la gestudentoj de la Nacia Hotelumada kaj Turisma Lernejo kie mi instruas trovas pli facile ol antau’e laborpostenojn. La proprietuloj de pluraj hoteloj, restoracioj kaj turismaj agentejoj venadas mem en la lernejon kaj petas pri kandidatoj por labori en iliaj entreprenoj. Same okazas en mulatj aliaj profesioaj lernejoj.

Nova fenomeno en tiu postkomunisma periodo estas la malfermig’o de privataj, nepublikaj lernejoj de c’iuj niveloj. Ilia nombro en la tuta lando ne certas (nur profesiaj mezlernejoj nepublikaj estas 50!) sed transpasis jam la nombron 100. Ilia valoro estas multobla: havigante pli bonajn instrukondic’ojn ili ne nur  plimotivigas siajn gelernantoj al la lernado sed ankau’ instigas la plialtig’on de la kvalito de instruado en la publikaj lernejoj kie la nombro de lernantoj en klaso foje superas 50 kaj la instruado okazas ofte je du turnoj pro manko de instruejoj; ili altiras multajn kvalifikitajn kaj kapablajn instruistojn pagante ilin pli bone; alportas pli rekte la progresig’intan mondan instrusperton, aparte kiam oni estas fonditaj de fremduloj (usonaj, italaj, grekaj, britaj, turkaj ka lernejoj).

Sendube la plej granda atingo nuntempe estas la nova etoso ekzistanta en la lernejoj, la demokratiaj interrilatoj establig’intaj inter gelernantoj kaj geinstruistoj, kaj inter geinstruistoj mem kaj la klerigaj superaj administraj organoj. La gejunuloj nun libere

esprimas siajn opiniojn kaj dezirojn, rimarkojn kaj vidpunktojn pri la instrulaboro, lernokondic'oj, siaj propraj problemoj kaj pli bona administrado.

Certe la edukado kaj klerigado en Albanio estas malvaste ligita kun la g'enerala ekonomia progreso kaj evoluo de la lando, publika ordo kaj jura sistemo, integrig'o de Albanio al la eu'ropaj kaj aliaj mondaj strukturoj.

(prelego por AIS - sesio en Karlovo, septembro 2003)

**Bardhyl Selimi**

Instruisto de matematiko

## Universala Kongreso en Svedio-2003

### Impresoj de nia membro Martha Otto

La 88a Universala Kongreso chi-somere komencighis jam en Hamburg, Germanio, kie mi partoprenis someran feston en la Esperanto-Klubo kun cha. 40 Esperantistoj el multaj landoj. Tie mi konatighis kun Peng Zhengming, china jhurnalisto, kaj lia 15-jara filino Nian. Ni kune veturis tra Danlando ghis la norda urbo de Fredrikshavn. Tie mi lasis mian auton kaj ni prenis grandegan kaj plenegan pramon al Gotenburgo. En belega kongresejo kunvenis cha. 1800 Esperantistoj el cha. 60 landoj - kiel chiam gaje parolante nian karan lingvon. La kongresa temo estis 'Lingvaj rajtoj kaj respondecoj', pri kio okazis interesaj prelegoj, seminarioj, diskutrondoj.

Mi loghis iomete for de la urbo en junulargastejo kun nederlanda paro. Ili ankau estis BELanoj, t.e. membroj de Bahaa Esperanto-Ligo, do ni kune kun aliaj amikoj aranghis kaj prizorgis nian informbudon. La loka bahaa komunumo anoncis publikan prelegon pri la temo 'Internacia Lingvo' kun vigla diskutado. Kelkaj svedaj amikoj tiel entuziasmighis pri Esperanto ke ili promesis kontakti la lokan E-o-klubon por eklerni la lingvon. Cetere, la lokaj volontuloj estis ege helpemaj dum la UK. Ech la vetero estis belega la tutan semajnon, ideala por ekskursoj, promenoj, marbanado.

Kiel lastan jaron dum la solena malfermo mi salutis la kongresanojn nome de la albana Esperantistaro, esperante ke Albanio baldau farighos europa lando, por ke pli da albanaj amikoj povu partopreni internaciajn kongresojn. Poste alparolis min diversaj homoj pri la nuna situacio en Albanio. Kun profesoro el Kosovo mi babilis dum pli ol horo pri Albanio, Esperanto kaj la Bahaa Kredo.

Cheestis multaj chinaj Esperantistoj varbinte por la venonta kongreso en Pekino - eble mi povos partopreni...

**Heide Martha Otto, Vlora, 10, 2003**

**KOMENTARIO DE ROLAND SCHNELL**

Antau la kongreso mi, kiel vicprezidanto de Esperanto-Ligo Berlin kaj respondeculo por loka gazetara laboro, deziris informi la gazetaron pri UK. Mi serchis en la reto por ekscii pri la temoj de UK, nome pri la cheftemo. Nenion mi trovis. Kion mi trovis tio estis amaso da certe utilaj teknikaj informoj por partoprenantoj kaj virtualan kongresejon. Tion mi taksis bona ideo. Shajnas ke UEA intertempe rezignis propagandi la temon, eble pro manko de intereso inter la kongresanoj. UK estas familia festo, kie oni renkontas malnovajn amikojn. Tio ne estas malbona kaj vershajne lau la deziroj de la plej multaj kongresanoj. (Lingvo-) politika evento ghi ne estas. Mi ne ploras pri chi tiu evoluo, char la politika tendenco de UEA kaj la strategio neniam plachis al mi. Pri la ehho en la

gazetaro oni povas diri, ke estis sukcesaj kelkaj de la "personigitaj" gazetaraj informoj lau modelo iam inventita en Germanio. Oni enmetas en gheneralan tekston la nomon kaj loghlokon de iu Esperantisto el la regiono. Lokaj kaj regionaj gazetoj volonte transprenas, malpli volonte la grandaj kaj tutlandaj. La tipa enhavo estas, ke iu maljunulo vojaghas al kongreso, kie li babilas kun malnovaj amikoj pri diversaj, sed ne indikitaj temoj. Chiuj popoloj interkomprenighas. Fakaj aranghoj ne estas menciitaj, la ekskurso jes.

**Roland Schnell**
**Berlin, D**
**(**c'erpita el "Heroldo Komunikas"**)**

**LA ALTERNATIVO PROPONITA DE ISTVAN ERTL**

En komentario pri HeKo n-ro 205 István Ertl, eksa UEA-redaktoro kaj redaktoro de retgazeto opozicia al la nuna UEA, precizigas ke li havas ankau proponojn, ne nur kritikojn:
"Mi kredas ke UEA pli facile kreskus kaj florus se la membroj vidus bone difinitajn celojn kaj disponus daurajn raportojn pri ties atingado. UEA devus senhezite prioritatigi iujn el siaj statutaj celoj kaj labori pri gxuste tiuj prioritatoj. Nome, klerigi pri kaj batali kontrau lingva diskriminacio sxajnas al mi la celo laustatuta kiu kaj helpus pli klare profili la Asocion eksteren kaj estus pli stimule inspira agmotivo ol unuavicigi la disvastigadon mem de Esperanto."
Efektive, tio shajnas nenio alia ol la ghisnuna informa strategio de Brusela Komunikada Centro, elpensita ne de Ertl, sed eventuale de David Fergusson, lau interpreto pri la Manifesto de Prago. Pri tiu strategio mem, kiu vekas pli kaj pli da perplekso interne al UEA, ni ne komentarias. Simple la redakcio povas serene konfirmi, ke ne ekzistas propraj proponoj de s-ro Ertl: li ja estas pamfletisto, ne managhero, stratego au ideologo.

## <u>Propagando por Esperanto</u>

### Kiel mi lernis Esperanton

En 1940 mi estis promenanta en publika parko, ekster mia urbo Fajum, oazo en la okcidenta dezerto de Egiptujo. Subite proksimig'is al mi, korpe malgranda sinjoro, kiu scivoleme demandis se mi vere kapablas komuniki kun la mortintoj.
Kiel sperta spiritisto, profunde konvinkita de la vivi post la morto, mi respondis klarigante kiel la afero estas tute natura. Tiam mi kutimis fari spiritan kunsidojn kun membroj de mia familio. Mi estis en vera kaj praktika kontakto kun la log'antoj de la nevidebla mondo, kiun ni eniras post la morto de la fizika korpo. Fakte c'iu homo estas trio. Estas la fizika korpo, vidata per niaj ordinaraj okuloj, la etera korpo kiu estas dublikato de la fizika. Kelkaj nomas g'in la animo. Nomoj ne estas gravaj. La tria estas la menso au' la Spirito, la inteligenta flanko de la homo. La etera korpo tenas la fizikan korpon dum la tera vivo. Post la tiel nomita "morto" la du korpoj disig'as. La fizika revenas al la tero el kiu g'i estas formata, kaj la etera kun la menso dau'rigas la vivon en la etera mondo.
Parolante kun la nekonato, li sciigis min ke nia movado (de spiritistoj) havas la saman celon kiel Esperanto kiu konsideras la homaron kiel unu granda familio. Mi demandis lin: kio estas Esperanto? Kaj li respondis: Esperanto estas internacia lingvo kiu celas rompi la murojn de la naciaj lingvoj por kunligi kaj proksimigi la homan familion. C'u tiu signifas ke Esperanto anstatau'igos la naciajn lingvojn ? Tute ne. C'iu lernas sian gepatran lingvon por uzo en sia hejmlando. Por kontakti la eksteran mondon li lernas duan lingvon. Tute logika kaj mirakle facila. Do, de la naskig'o oni lernas nur du lingvojn, la nacian kaj Esperanton. Tiamaniere ni forigos la diversecon de lingvoj kiu forrabas tempon kaj energion, kaj perdigas milope eblojn de kontaktoj.

Verdire la ideo estas pure racia kaj kiel spiritisto kiu kredas ke la Patreco de Dio kaj Frateco de homo, mi pensas ke ambau"movadoj celas la bonon de la homaro per la rompo de lingvaj baroj kaj religiaj muroj kreitaj per la nescio de homo. Mi estus tre dankema se vi bonvolus helpi min lerni tiun c'' lingvon. Volonte, mi estas je via dispono. La duan tagon mi komencis lerni la lingvon internacian. Post tri monatoj mi ekkontaktis la eksteran mondon koresponde. Por la unua fojo la tuta mondo malfermig''s antau''miaj okuloj kaj la horizonto de mia scio vaste etendig''s. Post ok jaroj la okazo sin prezentis por g''i la benon de Esperanto mondskale. En 1948 , mi reprezentis mian landon en la 33a Universala kongreso de Esperanto kiu okazis en Malmo. Kie ajn mi vojag''s , mi c''am trovis personojn kiuj estas pretaj helpi c''urilate. Mi spertis ke kiam oni vojag''s kiel Esperantisto, oni havas grandajn avantag'ojn, c'ar lalokaj esperantistoj helpas al la vojag'anto montrante al li la plej vidindajn artaj'ojn, klarigante al li la kulturajn strebadojn, la historion, la kutimojn de la koncerna lando. Lau' la atestoj de miloj da personoj, kiuj vojag'isutiligante la Internacian Lingvon, oni povas sen troigo aserti , ke tiamaniere oni havas pli da utilo el la kultura vidpunkto kaj el vidpunkto de internacia proksimig'o, ol per kiu ajn alia formo de vojag'ado.

Fortaj kaj multnombraj fadenoj ligas la personojn, kiuj parolas la Internacian Lingvon. La internacia lingvo estas ne nur teknika rimedo de internacia komunikado, sed ankau' forta instrumento de internacia komprenig'o, toleremo kaj paco.

**D-ro Nassif Isaac**

(c'erpita el la libro "Vojag'impresoj de egipto tra Eu'ropo kaj Azio per esperanto" eldonita en Egiptujo julie 1967)

- ## Entrudig'o de la angla

Sekve de la antaua komuniko, Mireille Grosjean (Svisio) atentigis ke la francaj inghenieroj de Michelin (franca fabrikanto de pneumatikoj) ne povus uzi la centimetrojn. Ili estis devigataj, flanke de Usono, indiki la dimensiojn en coloj. La afero estas sendube multe pli grava ol oni supozas, kaj tio iras pli malproksimen ol la nura devigo uzi la anglan. Certe ekzistas aliaj kazoj. Estus utile cirkuligi la informadon pri ili kaj atentigi pri tiu problemo ekster la E-medio. Aliflanke, Brian D. Kaanen (Vancouver, Kanado) atentigas pri forgeso de "In" en la titolo de la verkajho de David Rothkopf. Devas esti : "In Praise of Cultural Imperialism?" (Foreign Policy, Number 107, Summer 1997, pp. 38-53). La anglalingva originalo estas legebla che : http://www.mtholyoke.edu/acad/intrel/protected/rothkopf.html

**Koran dankon al Mireille kaj Brian.**

- Autoro de pluraj libroj, i.a. "Confronting War" (4-a eldono), Ronald J. Glossop, Sankta-Luiso, Misurio, Usono, prelegis en Gotenburgo, Svedio, la 29-an de julio 2003 pri la temo "Kial oni devus lerni Esperanton", por la "Tago de la Lernejo", kadre de la Universala Kongreso de Esperanto. Kun la afabla permeso de la autoro, lia prelego estas nun legebla en la lingvoj Esperanto, angla kaj franca en la sekcio "Dokumentoj", sub "Pedagogia intereso", de la ttt-ejo <http://www.esperanto-sat.info>, sub la titoloj "Kial oni devus lerni Esperanton", "Voici pourquoi l'on devrait apprendre l'espéranto", "Why we should learn Esperanto". Tiu dokumento estos aparte utila, nun, en la komenco de la lernojaro en la norda hemisfero, kiam la edukministroj parolas pri la lernado de LA lingvoj dum ili atribuas kreskantan lokon

al ununura kukola lingvo, ech ekde de la baza lernejo : tiu de sovagha senskrupula ekonomia sistemo. Ronald J. Glossop instruis filozofion en la Universitato de Sud-Ilinojso, en Edwardsville. Pasintjare, en Mexico, li prelegis pri la Internacia Krim-tribunalo kaj pri Politikaj kaj Lingvaj Aspektoj de La Tergloba Komunumo. Tie, li starigis diversajn demandojn, i.a. : "Chu la plej potenca nacioshtato Usono rajtas decidi chion por la tuta monda komunumo kvankam sia loghantaro estas nur 4,5 procentoj de la monda tuto?" (...) "Simile, chu la anglaparolantoj rajtas postuli, ke chiuj aliuloj uzas la anglan lingvon? Chu la chinaparolantoj rajtas postuli, ke chiuj aliuloj uzas la chinan lingvon? Char en la mondo estas dek tri naciaj lingvoj, kiujn parolas pli ol cent miliono da personoj, shajnas, ke ne estas iu ajn nacia lingvo, kiun la tuta homaro devus uzi. Tial la unuopa planeda komunumo bezonas sian propran unuopan sennacian lingvon, Esperanto."

Ronald J. Glossop estas ankau membro de SAT. Esperanto-traduko de lia libro "World Federalism ?" aperis sub la titolo "Monda Federacio ?" (vd recenzon de Kep Enderby en "Monato" che <http://www.esperanto.be/fel/2002/007693.html>). Legenda ankau en la angla : <http://www.rftstl.com/issues/1999-07-21/nd2.html>
**(c'erpita de Henry Masson)**

- **KIAL ONI DEVUS LERNI ESPERANTON ?**

"Kial oni devus lerni Esperanton?" Kompreneble, la respondo ne estas la sama por c^iu persono. Plue estas diversaj specoj de kialoj. Mi volas diskuti kun vi kelkajn el ili en tri kategorioj. Tiuj tri specoj de kialoj estas (1) la praktikaj kialoj, (2) la mens-pligrandigaj kialoj, kaj (3) la moralaj kialoj. La unua praktika kialo, kiun mi volas mencii, estas por amuzi vin. Per Esperanto vi povas renkonti kaj konatig^i kun multaj bonkoraj, interesaj, kleraj, lertaj, talentaj personoj, vojag^i al diversaj landoj tra la tuta mondo, g^ui vere internaciajn festojn, kaj auskulti muzikon kaj danci dancojn de multaj kulturoj. La tuta planedo povas ig^i via ludejo. La dua praktika kialo estas por havi konatajn (kaj ec^ g^is nun nekonatajn) samideanajn amikojn, kiuj salutos kaj bonvenigos vin ie ajn en la mondo. Kelkfoje ili ec^ invitos vin mang^i kaj resti en siaj domoj en foraj landoj. Kiel Esperantistoj ofte diras, "Se vi volus gajni monon, studu la anglan; sed se vi volus havi amikojn, lernu Esperanton." Sendube estas vera aforismo, ke Esperantistoj havas bonajn amikojn c^ie. Preter tio, ne forgesu, ke kelkfoje Esperantistoj ec^ trovas edzon au edzinon, c^ar ili estas parto de la Esperanta komunumo. La tria praktika kialo lerni Esperanton, speciale por infanoj en anglaparolantaj kaj Aziaj landoj, estas, ke Esperanto provizas bonan manieron komenci la studon de alia lingvo krom la denaska lingvo. Diversaj eksperimentoj montras, ke lernantoj povas pli rapide lerni la lauregulan lingvon Esperanton ol Europajn naciajn lingvojn kiel la anglan kaj la francan. Plue oni povas observi, ke lernantoj, kiuj unue studas Esperanton anstatau pli malfacilajn lingvojn, poste pli avide lernas aliajn lingvojn. Ili sentas, ke ili havas la kapablon fari tion. Male, la studado de pli malfacilaj lingvoj tiel la latina kaj la angla ofte malkurag^igas la lernantojn provi lerni aliajn lingvojn. Nun mi turnig^u al la dua speco de kialo studi Esperanton, nome, por pligrandigi vian menson per pli bona kompreno de la mondo. Kiel bone diras Kanada Esperantisto Doktoro Stevens Norvell el Nov-Skotio, Esperanto estas "fenestro al la mondo." Kiam oni kapablas legi kaj audi nian lingvon, oni povas informig^i pri aliaj landoj, aliaj kulturoj, kaj aliaj vidpunktoj per libroj, j^urnaloj, revuoj, sonbendoj, vidbendoj, radiaj kaj televidaj elsendoj, retejoj, kaj ret-mesag^oj. Oni povas informig^i

el neutrala vidpunkto pri kio okazas tra la tuta mondo. Plue ne estas nur specifaj informoj, kiujn vi povas ekscii. Oni gajnas ankau pli bonan mondkoncepton g^enerale. Oni ne plu estos tiel ligita per lingvo al malgranda parto de la Tero kaj la vidpunktoj de tiu lingva au kultura komunumo. Oni konatig^as kun la tuta homa komunumo. La tria speco de kialo lerni Esperanton estas por mi la plej grava. G^i estas la morala kialo, kaj g^i havas du flankojn. Unue, oni povas havi rilaton kun aliaj personoj tra la tuta mondo sur bazo de egaleco kaj justeco c^ar oni uzas tutteran neutralan lingvon anstatau la propran nacian lingvon. Vi ne postulos ke aliuloj uzu vian lingvon, kaj ili ne postulos, ke vi uzu ilian lingvon. Sekve ekzistas sento de egaleco kaj justeco inter vi kaj aliuloj. La dua aspekto de la morala speco de kialo lerni Esperanton estas la fakto, ke, kiel Esperantisto, oni helpas krei evoluantan harmonian tutmondan komunumon. Per Esperanto oni ig^as parto de tre grava historia movado, kiu antauenigas la solidarecon inter c^iuj homoj. Esperanto ne estas nur lingvo. Ni Esperantistoj konstituas tute novan specon de universala komunumo bazita sur la uzo de nia tutmonda lingvo. Ni nun kune movig^as preter la inter-naciismo de la dudeka jarcento al la tutmondismo de la dudek-unua jarcento. Tamen ni samtempe helpas konservi la multajn naciajn lingvojn en la diversaj mondpartoj; tiel ni konservas la lingvan diversecon. Sendube estas aliaj kialoj lerni Esperanton, kiujn mi ne menciis. La situacioj kaj motivoj de homoj estas tre diversaj. Tamen mi esperas, ke la ideoj, kiujn mi presentis c^i tie, helpos vin persvadi aliulojn, ke ili devus lerni Esperanton kaj alig^i al nia evoluanta tutmonda komunumo.

## • LINGVA DEMOKRATIO AU LINGVA DEMAGOGIO?

La propono de universala lingvo kaj la defendo pri la lingvaj minoritatoj estas unu el la historiaj kontraudiroj de la esperantismo. Unuflanke la filozofio kiu akushis la sloganon "Unu Dio, unu mondo, unu lingvo"; filozofio al kiu referencas (malgrau Dio) ankau la sennaciismo de Lanti. Aliflanke la batalo kontrau lingvaj hegemonioj, la defendo de minacataj lingvoj kaj kulturoj. Esence la kontraudiro fontas el malsamaj signifoj kiujn la E-istoj donas al la vorto "lingvo", kaj el la malsama intenseco kiun ili metas sur tiun signifon. Defendi la etnoplurismon signifas defendi identecojn -- identecojn kiujn lingvoj difinas. Do lingvo kiel identigilo. "Unu mondo - unu lingvo" signifas ke la lingvo estas precipe komunikilo; au ke necesas iu superlingvo por krei iun superidentecon. La kontraudiron fakte solvas la raumismo: Eo estas la lingvo de la E-istaro, kaj la E-istaro mem estas lingva minoritato. Sekve, kiel ajn grava komunikilo estus Eo en la mondo, ghi estas ankau identigilo por specifa homa grupo. La alianco kun la lingvodefendantoj havas sencon, se oni opinias, ke ankau la lingvo de la E-istaro devas esti defendata. Alimaniere pravus Lanti, kiu ghojis kiam iu lingvo mortis, char plia pasho survoje al la triumfo de Eo, interpretata kiel idiomo de la triumfonta proletaro, pli ol de la E-istaro. La finvenkismo ne solvas la kontraudiron, sed akrigas ghin. La etnoplurismo estas en tiu kazo akceptata kiel taktika rimedo survoje al la “fina venko”: ni batalas kontrau la konkurenco de la angla, apogante la lingvodefendantojn. Ne temas pri batalo por io, sed chefe kontrau io. En tiu kunteksto, la strategio praktikata lastatempe en UEA, trovebla en la kongresa rezolucio de la lasta UK, au en la filozofio kiu inspiras la Bruselan Komunikadan Centron, ne estas lingva demokratio, sed lingva demagogio. Ni daure kredas en la respekto pri la lingvaj rajtoj, lau la Universala Deklaracio proklamita en Barcelono, 6 junio 1996. Kaj tiu deklaracio kondukas aliloken, ol shajnas iri la nuntempa UEA, ekde Prago 1996 (la sama jaro). La Deklaracio de Barcelono, kombinita al raumismo, kondukas la novan Esperantion al partopreno en Sociaj Forumoj.

La Manifesto de Prago, kombinita al etnoplurismo, kondukas la malnovan Esperantion al flirtado kun shovinismoj. La sama flirtado kiu interalie, en la 1930aj, forghis en Romo la sloganon: "Eo kiel rimedo por defendi kaj disvastigi la italecon tra la mondo". Nature, kun multaj nuancoj. La realo estas plejparte griza, anstatau blanke-nigra.

**(Giorgio Silfer)**

## Novaj'oj

- **Vizito de polaj samideaninoj**

Je la mezo de au'gusto vizitis Albanion du polaj samideaninoj, Anna Skudlarska kaj s;ia amikino Magda. Anna estas magistro kaj Magda baldau' farig'os doktoro en politikaj sciencoj en Varsovio. Ambau' estis afable gastigitaj c'e s-ro Shaban Hasani, membro de Pasporta Servo en Tirana. Ili vizitis kelkaj urbojn kaj estis akompanitaj krome de B.Selimi kaj A.Myrazi dum promenado tra Tirana. Antau' ol foriri ili trapasis en Kukes, norda urbo kaj Shkoder kie ili vizitis la gefamilianojn de s-ro forpasinta Zef Mjeda, Honora membro de UEA. S-ino Anjeze Mjeda invitis ilin tranokti c'e s'i antau' ol ili foriri al Montenegro.

**Rita Permeti**

- **Forpasis samideano Tomasz Jan Kudrewitz**

Je la tria tagdeko de au'gusto alvenis la malfelic'a novaj'o: forpasis samideano Tomasz Jan Kudrewitz, eminenta esperantisto el Bydgoszcz. Mi estas renkontinta lin septembre 1998 en la sidejo de Monda Turismo kaj havis la okazon multon interbabili kun li. Ankau' antau'e , kiel post mia vizito mi pleje interrilatig'is kun s-ro Tomasz c'ar fakte li estis la motoro de MT . Inter alie s-ro Tomasz prizorgis la varbadon kaj dokumentadon de niaj gestudentoj c'e la klerigejo de MT kaj AIS. Tion li faris envere diligente. Tomasz estis klera, modesta kaj afabla homo. Lia sano estis tuttempe malbona , tamen li laboris arde kaj honeste. Certe per la forpaso de amiko Tomasz pola Esperanto –Asocio perdis tre valoran aktivulon , sed ne nur g'i.

**Bardhyl Selimi**

- **CIRKULERO DE LA TRANSNACIA RADIKALA PARTIO**

En sia lasta cirkulero de 4a de au'gusto 2003, signita de prezidantoSergio Stanzani kaj trezoristo Danilo Quinto, interalie oni notas: Okaze de la ordinara sesio de Unuig'intaj nacioj c'i septembre la Transnacia radikala Partio starios la ideon por krei the unuajn grupojn de demokratiaj s'tatoj kiuj malferme deziras labori kune pri diversaj aferoj, kelkaj el kiuj koincidas al la objektivoj de TRP:

- La rajto for demokratieco kiel fundamentan homan rajton akirite historie.
- La universala abolicio de la mortkondamno.
- Batalo kontrau' inan genitalan kriplig'on.
- Internacia justeco.
- Libereco de scienca esplorado
- Konvertig'o de militistaj strukturoj kaj elspenzoj al civilaj strukturoj kaj elspenzoj.
- Reformig'o de UN konventoj pri drogo
- **Esperanto kiel internacian lingvon**

Kiel sciite, pluraj membroj de nia Instituto estas samtempe membroj de Transnacia Radikala Partio. Tiu lasta postulas envolvig'on de c'iuj ties membrojn ankau' en tiun kampanjon.

**Matilda Sokoli**

- Gekaraj, jen denove bela novajho el Trp (Transnacia radikala partio):

http://www3.europarl.eu.int/omk/omnsapir.so/cre?FILE=0904je&LANGUE=IT&LEVEL=DOC&NUMINT=4-020&LEG=L5

Kaj jen mia (pliboniginda!) provo ghin traduki en Eo:

-----------------

Integra raporto pri la seancoj
SEANCO DE JHAUHDO 2003-09-04
Eu-plilarghigo kaj kultur-diverseco (regionaj kaj malpliuzataj lingvoj)

Cappato (NG) – Sinjoro Prezidanto, mi timas, ke, bedauhrinde, la situacio malpli pozitivas ol pluraj intervenoj intencus kredigi. En Euhropo, lingvodiverseco detruighadas. Koncize, mi opinias, ke la solvo de tiu problemo kushas ne en nura subtenado de lingvoj auh de minoritat-lingvoj, char tio ne – ja ne – sufichas. Mi opinias, ke la solvon enhavas nomo nek facila nek komforta: Esperanto. Ni provu, almenauh! Lauh iuj studoj, tiu lingvo – kiel teknika, neuhtra lingvo – povus esti lernata kaj, sekve, politike elektita, anstatauh aliaj lingvoj. Uzadi, kiel solajn lingvojn auh kiel ponto-lingvojn, aliajn idiomojn - kiuj mem reprezentas kaj enportas difinitan kulturon - rezultus el superregado de iu kulturo super alian, kio ja hodiau okazadas. Tiun problemon, tiun mankon, Esperanto ne kuntrenas. Se verus - kaj tion mi kredas – ke tiu lingvo lerneblas tiel facile kiel multaj internaciaj studoj pruvas, mi opinias, ke Euhropa unio devus, minimume, ankauh tiun vojon ekeksperimenti. Kontrauh konduto detruanta lingvo-diversecon, [lingvo-] financado kaj subtenado malsufichas.
-----------------

Eta rimarko: M. Cappato estas radikala deputito; kiel tia, li apartenas al neniu el la tradiciaj parlamentaj grupoj. Tion memorigas la mallongigo NI ("non iscritto"; en Eo: NG, "ne grupighinta") apudmetita al lia nomo.

Mi certas, ke vi helpos disvastigi la informon. Dankon.

Ps: por informpetoj, gratulleteroj, preteco kunlabori, ktp, bv skribi al mcappato@europarl.eu.int (kiom-eble, kun kopio al mi: ranieri.clerici@tin.it ).
Dankon.
**Clerici Ranieri**

- **Komputado leksikono senpage!**

Oni povas peti komputadan leksikonon senpage de Rubert Feldman Gonzales. La vortaro estas 78 pag'a, en komputila formato g'i estas 1138 kilobajtojn granda. Oni povas peti g'in de : Ruben Feldman Gonzales . Rete: rufegonz@mxl.cablemas.com
**(c'erpita el Bulteno de TEA, au'gusto 2003)**

- **LA 16a EKUMENA ESPERANTO-KONGRESO EN RIMINO**

La Ekumena E-Kongreso sukcese disvolvighis en Rimino, inter la 30a de augusto kaj 6a de septembro 2003. La kongresa temo estis "Vi estos miaj atestantoj (Agoj 1, 8; Adoru 560), salo kaj

lumo por la mondo (Mat 5, 13+14)". La kongreson partoprenis ch. 280 kredantoj, membroj de KELI kaj IKUE, el dek ses landoj. Post la sukcesa prezento de "La familio de Anto Speri" (sabaton vespere), de Giorgio Silfer, sekvis interesaj programeroj kiel prelegoj ekz. pri kristanaj viktimoj dum la dua mondmilito; pri la temo de la kongreso; kulturaj programeroj kiel publika orgena koncerto de Ernst Leuze, muzik-direktoro (DE) kaj plublika koncerto de Anjo Amika; prezento de "La Ne Dia Komedio" de Giovanni Conti. Multaj partoprenantoj ghuis la duontagan ekskurson en San Marino, kaj la tuttagan eksurson en Raveno. Pri la vidindajhoj de Raveno, ni auskultis tre interesan kaj tre bonkvalitan prelegon de Zoltán Somhegyi, antau la ekskurso. Dum liberaj tempoj - danke al la bona vetero - ni havis eblecon naghi en la maro, kiun ni atingis post ch. kvinminuta piediro La membroj de IKUE elektis kiel prezidanton: Miloslav Svachek.

- **KOMENTARIO DE VILHELMO LUTERMANO PRI ANTISEMITISMO**

Dum la lasta SAT-kongreso en Chaudefono, mi havis okazon kaj kialon laudi la Esperantan Civiton pro sia politika sinteno kaj la bona organizo de nia kongreso. [NdR: la kongreson organizis KCE, establo alighinta al kaj subtenata de la Pakto por la Esperanta Civito] Sed nun mi rimarkis strangajhon de la Konsulo, do ghia plej supera pinto, pri "antisemitismo kaj rasismo". Unue direndas, ke antisemitismo estas formo de rasismo, do, ghenerale "rasismo" sufichas por enteni ankau la antisemitismon. Kial do tiu malgramatika apudmeto de ambau nocioj? Se temas pri tio ke antisemitismo estas aparte kondamninda sinteno pli ol aliaj formoj de rasismo, oni povus diri ekz-e "rasismo kaj aparte ties antisemitisma formo". Vershajne la autoro pensas ke antisemitismoestas krom rasismo ankorau io alia (religia malamo ekzemple). Sed al kio kondukas tiu distingo? La nocio antisemitismo estas sufiche klara, chiukaze la historio de la lasta jarcento sufiche plorinde markis ghin: rasismo kontrau la judoj (tiel la difino de la franca "Le Petit Robert"). Malgrau tio, la nocio antisemitismo estas nuntempe tre larghe misuzata de certaj israelaj kaj certaj porisraelaj rondoj por brulmarki chiajn kritikojn kontrau la politiko de la israela registaro. Por tiuj rondoj, kritiko al la kontraupalestina politiko de la israela chefministro egalas al antisemitismo kaj la kritikantoj al antisemitoj. Notindas ke inter la kritikantoj de la israela politiko trovighas multaj amikoj de la judoj. Ekzemple multege da nuntempaj germanoj sentas sin pro la krimoj de siaj antauuloj aparte alvokitaj protekti la judojn, sed tio ne malhelpas ilin kritiki la politikon de la israela registaro. Amikeca kritiko, kaj pro sento de justo kaj por eviti pli negativajn sekvojn por la israela estonto. Sed la menciitaj rondoj fidenuncas ilin kiel antisemitojn. Kaj la fino de la Konsula teksto prezentas la konkludon: "Kiuj konscie partoprenas en antisemitismaj atestoj kaj agoj, tiuj ne havas shancon por ricevi la Esperantan civitanecon okaze de peto." Jen oni vidas ke la rasismo servis nur kiel rimedo por kamufli ion alian, nome: La Civito fortenas de si ne eksplicite la rasistojn kontrau palestinanoj nek tiujn kontrau iu ajn alia popolo, sed nur tiujn kontrau judoj, kaj -- se oni atentas la kutimojn de la lastaj du jaroj - plej vershajne chiujn kritikantojn de la israela politiko. La plej milda esprimo, kiun mi trovas por tio, estas diskriminacio. Kiu miksas kaj konfuzas la plej radikalan kaj malhumanan formon de cionismo kun judeco, tiu estas mem, objektive kaj certe nekonscie, antisemito. Mi esperas ke la respondo de la Konsulo montros ke mi eraras en mia supozo.
**Vilhelmo Lutermano**

- **LA KONSULO RESPONDAS PRI ANTISEMITISMO KAJ RASISMO**

En mia deklaro de la 10a de augusto 2003 mi skribis, ke antisemitismo kaj rasismo estas la doktrinoj malrespekti aliajn pro iliaj religia, rasa au kultura apartenoj. Certaj opinias, ke antisemitismo jam estas entenita en la koncepto de rasismo, do pro kio aperas tiu stranga distingo inter rasismo kaj antisemitismo? Ghi venas de diversaj fontoj, antropologiaj, historiaj kaj politikaj. Antropologiaj (sociaj, ne fizikaj), char distingo inter homoj povas esti rimarkata per fenotipaj ecoj. Chiu vidas diferencon inter nigra kaj blanka homoj kaj por tion vidi oni ne bezonas esti rasisto. Do por ne vidi la diferencojn en unua kazo oni devas esti blinda, en dua kazo ne edukita. Historie estas la nazioj, kiuj atingis perfektecon en la distingo de judoj, ech se la distingo multfoje estis absurda kaj ech ne tio estus la plej tragika, sed tio, kion ghi rezultigis. Pro tio gravas tiel forte la historia distingo, kiel necesa memoro pri shoa/holokausto! Fine la realeco en nuna etnisma kaj multkultura mondo estas la socia kaj politika konstruoj de la socia realeco, kiu dependas de politikaj cirkonstancoj kaj ne abstraktaj ideoj pri justeco, rasismo au Esperanto. Ekzemple Usono neniam de la komenco de la unua censado en 1790 distingis judojn kiel rason au etnan grupon, dum kiel etna grupo estis distingitaj en 2000 Latinos au "Native of Guam" kaj chirkau 220 aliaj grupoj rasaj kaj etnaj kune kun miksaj! Jen la politika konstruo de la realeco! Dum antisemitismo estas hodiau en Usono same punata kiel rasismo. Jen la paradoksoj de la socia konstruo, kiu ne mankas en chiu lando, kiel antau kelkaj jaroj en Germanio, kiam prioritaton de la civitaneco oni atribuis al la "sangaj" kriterioj, ne ekzemple teritoriaj au meritaj. Rasismo (ech la plej milda) ne signifas samon kion signifas antisemitismo, char rasismo elvokas fenotipajn (fizikajn, videblajn) diferencojn, dum antisemitismo elvokas ie en la profundeco la religiajn, kulturajn kaj mondkonceptajn (ideajn) diferencojn inter la judoj kiuj atendas Mesion, por doni al ili la eternan pacon, kaj kristanoj por kiuj Kristo (mem judo) mortis sur la kruco por savi la homaron. Tiuj diferencoj mensaj estas pli, mi ne listigas ilin, sed ghuste ili atestas pri la grava distingo inter la rasismo kaj antisemitismo. Rasismo ekzistas chie, kie kunekzistas apartaj rasoj. Antisemitismo povas ekzisti ech tie, kie neniu, neniam, vidis judon. Ekzemple Stalin havis neniun pruvon, ke judaj kuracistoj volis lin veneni (ech komence li ne sciis, ke kelkaj el ili estas judoj), sed akuzis pri tio judojn, ne indianojn. Se la kuracistoj estus indianoj, kaj li vidus tion, plej vershajne li akuzus indianojn, sed "pura" antisemito, ech povas rimarki en indiano la judon! Mi ironias, sed ne fore mi estas de la vero. Jen la antisemitismo! Tia antisemitismo naskighadis en la kapoj de multaj poloj, rusoj, italoj, francoj antau la dua mondmilito, ne parolante pri germanoj, kiuj eksciadis ofte de la polico ke ies najbaro estas judo, lau oficialaj kriterioj. Tia kaj similaj antisemitismo(j) ekzistas ghis nun. Neniam internacia diplomatio rekonus Israelon kiel shtaton, sen la antaua holokausto. Do prefere ni chiam atentu kio kashighas sub kio. Estas tre facile akuzi Israelon pro rasismo, forgesante ke judoj (cionistoj) ricevis en 1948 la patrion por kompensi interalie la krimon de shoa. Vershajne tio estis eraro de la internacia politika juro, tamen ni vidu tion ne en la abstraktaj kategorioj de iu rasismo, sed historie kaj politike. Do la sorto de la palestinanoj ne estas konsekvenco de la cionismo, sed pura konsekvenco de la holokausto, kovrita nun de rasismo de judoj, kaj ghi havas nenion komunan kiel subkaraktero kun la antisemitismo.

**Walter Zelazny, Konsulo**

- **DUC GONINAZ PRI LA POLAJ EVENTOJ 1985-87**

Prof. Mic.hel Duc Goninaz, chefreviziianto de PIV, vicprezidinto de la Akademio de Esperanto kaj membro de gvida instanco en SAT, komentarias en la lasta numero de LF (kiu, lau PIV mem, prave signifas nur "Literaturan Foiron", ne lingvan festivalon, ne Liberan Folion) la eventoj kies viktimo estis Sennacieca Asocio Tutmonda en Pollando, dum la jaroj 1985-87. Ni diskonigas la komentarion, kun la permeso de la redakcio de LF.

* * *

Kun granda intereso mi legis la artikolon "Denove Varsovio komunikas", publikigitan en LF 201 (februaro 2003). Mi konsentas kun la marghena komento, ke necesas finlegi la malnovan paghon pri historio, kiu koncernis multajn el ni. Sed tiun dosieron ni ne povas fermi, dum chiuj dokumentoj ne estas publikigitaj. Shajnas al mi, ke la nunaj posedantoj de la arkivo de Pola Esperanto-Asocio devus malfermi tiun dokumentaron al studantoj de la historio de la Esperanto-Movado, por ke chiuj povu kompreni la aluditajn okazintajhojn. Mi deziras hodiau korekti unu malgrandan eraron en la kronologio de la p. 28. Ni legas tie: "1986 01 31: Malfondighas LKK de la 72a UK (vd LF 99:1987). SAT proteste rezignas kongresi en Pollando." La vero estas iom alia: 1. Formale ne ekzistas rekta rilato inter la <<malfondigho>> (fakte shangho) de LKK de la 72a UK kaj la ne-okazigo de la antauvidita SAT-Kongreso en Krakovo en 1987. Se SAT estus decidinta ne kongresi pro incidento, kiun la gvidantoj de UEA jughis malgrava, tio estus ghiaflanke enmiksigho en la aferojn de UEA. La shanghoj, okazintaj en la LKK estis konsekvenco de la pucho, okazinta en PEA en oktobro 1985, per kiu la <<esperantistaj>> komplicoj de la Jaruzelskia bando rekaptis la povon, kiun ili perdis en 1980. 2. La ne-okazigo de la SAT-kongreso estas evidente alia konsekvenco de la pucho de la kanajloj, kiuj intervenigis politikan instancon kontrau la gvidantoj de la demokratighinta PEA. Sed tiun ne-okazigon decidis ne SAT, sed ja la "Provizora Estraro de PEA" sub la prezidanteco de W. Wesolowski.
La afero de la SAT-Kongreso povas do resumighi jene: la 27an de julio 1983 PEA sendis al SAT inviton kongresi en Pollando en 1987; la 24an de februaro 1986 la "Provizora Estraro de PEA", rezultinta de la pucho, nuligis tiun inviton. Sen tiu invito SAT ne povis organizi la kongreson. Post restarigo de la vero pri tiu chi punkto (nome SAT ne proteste rezignas kongresi, sed: al SAT oni malpermesas kongresi) povas veni komentoj. Mi provos ilin koncizigi: Unue, la estraro de UEA solidarighis nek kun la likvidita LKK nek kun SAT: ghi okazigis la UK-on en Varsovio, kvazau tio normalus. Due, la Jaruzelskiistaj gvidantoj de PEA -- kaj, ech pli fie, kelkaj el iliaj <<okcidentaj>> samideanoj, kiel la tiamaj redaktantoj de "Internaciisto" -- klopodis pravigi tiun malpermeson. La chefa argumento estis la publikigo en "Sennaciulo" de artikoloj, kritikantaj la Jaruzelskian politikon. Krom la fakto, ke "Sennaciulo" estas tribuno por libera diskutado (ne organo de iu Centra Komitato kun obeenda linio), oni povas jughi pri la honesteco de tia argumento, kiam oni konstatas, ke la plej granda parto de tiuj artikoloj - interalie mia artikolo "Solidarecon kun Solidarnosc!" de januaro 1983, kiu aparte furiozigis la Jaruzelskianojn - estis publikigita antau la invito al SAT kongresi en Pollando: ili do
estis bone konataj de tiuj, kiuj faris la inviton. Tia stalinisma sinpravigo fare de la puchintoj ne estas miriga. Kaj, se oni permesas al mi personan rimarkon, min ne indignigas la fakto, ke minimume tri fojojn mia nomo estis menciita en la konfidencaj

kunsidoj de la puchintoj. Esti nomata <<malamiko de Pollando>> fare de tiaj homoj estas honoro.

**Michel Duc Goninaz**

(C'erpitaj el "Heroldo Komunikas")

**<u>Studado</u>**

**Informo de Internacia Turisma Agentejo Esperantotur**

Estimataj! Ni sendas al Vi aldone programon de la 24 Sesio de AIS-Klerigejo Bydgoszcz (AKB), kiu estos komenco de la studjaro en ISTK/AIS dum la studjaro 2003/2004. Ni rimarkigas, ke la Sesio komencigxos en Bydgozscz jxaude la 25-an de septembro 2003 j. Samtempe ni informas, ke estas bona ebleco rezervi tutjaran logxadon en apude situanta (kelkcent metroj) sporta hotelo "TORBYD", str. Chopina 11A. Logxado tie kostos po monate/persone 250 zlotoj, do, iom pli ol 60 USD. Informu nin kiam Vi venos al Bydgoszcz kaj c'u Vi volas rezervi la logxadon en tiu hotelo.

Kore salutas Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo Bydgoszcz, Pollando

**29 INTERNACIA FORUMO PRI TURISMO, EDUKADO KAJ KULTURO**
**kun 24 AUTUNA STUDAD-SESIO de AIS-KLERIGEJO BYDGOSZCZ (AKB)**
**kaj INTERNACIA STUDUMO PRI TURISMO KAJ KULTURO EN BYDGOSZCZ-**
**KLERIGEJO DE AKADEMIO INTERNACIA DE LA SCIENCOJ**
**BYDGOSZCZ, 25-28 SEPTEMBRO 2003**

Programo inkluzivas kurson por turismaj informantoj [lecionoj signitaj (it-1) gxis (it-12)] kaj fundamentoj de la internacia lingvo Esperanto [lecionoj signitaj (1) do (8)], instruado de Esperanto lau Cseh-metodo(1-4) kaj 4 kursoj, de turismo, kulturo kaj lingvoj - kune por studentoj de ISTK/AIS - gxis 10 STU

25 SEPTEMBRO – JxAUDO

08:00-09:30 Organiza kunveno por studentoj de la 1. jaro; ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (1) 09.45-11.25 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (2) 11:30-13:00 ASci. Regina Grzębowska – Taskoj de turisma informado (it-1) 13.00-13.30 Kompletigo de okumentoj kaj pagoj, ricevo de indeksoj kaj legitimiloj en sekretariejo de Studumo (str. M.Sklodowskiej-Curie 10 – II etagxo) 13.30-15.00 ASci. Ewa Bondar – Seminario pri Cseh-metodo (1) 15:15-16:45 S-ro Augusto Casquero de la Cruz — Hispana lingvo (1) 17:00-18:30 S-ro Augusto Casquero de la Cruz — Hispana lingvo (2) 19:00-22:00 mag. Kazimierz Ludwicki – Bibliografia turystyczna (it-5-6) 19.:00-22:00 S-ino Mara Timermane - Turismo en Baltaj Landoj (1-2)

26 SEPTEMBRO – VENDREDO

08:00-09:30 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (3) 09:45-11:15 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (4) 11:30-13:00 ASci. Regina Grzębowska – Taskoj de turisma informado (it-2) 13:30-15:00 ASci. Ewa Bondar – Seminario pri Cseh-metodo (2) 15:15-18:15 S-ro Moliere Ngangu Nduantoni - Franca lingvo en Afriko (1-2) 19:00-22:00 Internacia Vespero okaze de Monda Tago de Turismo : S-ro Augusto Casquero de la Cruz — "Hispana lingvo" kun degustado de paella (3-4), ("SKONPRES" en Kruszyn, starto de buso de ISTK - h. 18.15) - 1 STU

27 SEPTEMBRO – SABATO

08:00-09:30 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (5) 09:45-11:15 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (6) 11:30-13:00 ASci. Regina Grzębowska – Taskoj de turisma informado (it-3) 13:30-15:00 ASci. Ewa Bondar – Seminario pri Cseh-metodo (3) 15:15-18:15 S-ino Mara Timermane - Turismo en Baltaj Landoj (3-4) - 1 STU 15:15-18:30 mag. Kazimierz Ludwicki – Bibliografia turystyczna (it-7-8) - 1 STU 19.00-22.00 ASci. Andrzej Grzebowski - Internacia Esperanto turismo (it-9-10) 19:00-22.00 S-ino Le Thi Thien Thu - Turismo en Vjetnamio(1-2)
28 SEPTEMBRO – DIMANCxO
08:00-09:30 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (7) 09:45-11:15 ASci. Ewa Bondar – Baza Cseh-kurso de Esperanto (8) - 2 STU 11:30-13:00 ASci. Regina Grzebowska – Taskoj de turisma informado (it-4) - 1 STU 13:30-15:00 ASci. Ewa Bondar – Seminario pri Cseh-metodo (4) - 1 STU 15:15-18.15 S-ino Le Thi Thien Thu - Turismo en Vjetnamio (3-4) - 1 STU 15:15-18:15 ASci. Andrzej Grzebowski - Internacia E-Turismo (it 11-12) - 1 STU 19:00-22:00 S-ro Moliere Ngangu Nduantoni - Franca lingvo en Afriko (3-4) - 1
STU
Sukcesojn dum la Sesio !

**<u>El la diplomlaboraj'oj de niaj studentoj</u>**

## 2.2.Albanoj en Eksjugoslavio

Lau' multaj esploristoj la albana etna linio en eksa Jugoslavio ekas de Novi Pazar, kontinuas orienten post kiam g'i devojig'as iome suden, poste direktig'as al la norda ekstremo proksimume en la distriktoj de Nis', malsupreniras g'is iu punkto en nordoriento de Vranja ekster Vranja, kaj kontinuas c'iamfoje al la sudo je direkto de Manastir ( Bitolje) inkluzivante Pres'evon, Kumanovon, S'kupon, Tetovon, Gostivaron kaj Kerc'ovon. Nordokcidente tiu etna linio inkluzivas ene de g'i Roj'ajon, Tuzon, Istogon, Pejon, Plavon, Gucion, Podgoricon, Hoton, Grudon kaj Ulqin-on (lau' la mapoj de bulgara geografo D. Rizov en la jaro 1917 kaj mapoj reeldonitaj de Mit-hat Frasheri en la jaro 1919 en lia libro "Albanais et slaves".)
En la jaro 1924, post la registrig'o de 1921 en eksa jugoslavio, oni eldonis etnografian mapon. Tiu mapo montris la log'antaron kies patrian lingvo estis la albana kaj la log;antaon musliman en eksa Jugoslavio.
Lau' la lingva mapo la etna limo pasas multe norde de Mitrovica kaj kontinuas je direkto Sudo-Oriento apud Vranja inkluzivante ene de si Mitrovicon, Vuc'iternon (Vus'trion), Pris'tinon, Podujevon kaj poste malsupreniras suden, multe pli oriente de Gilano inkluzivita tie kune kun Pres'evo kaj Kumanovo; laste la etna linio c'irkau'as S'kupon kaj atingas sude je apudeco de Veles. La dua mapo, tiu de la log'antaro muslima difinas la samajn liniojn kun diferenco ke g'i inkluzivas ene de g'i Novi Pazar-on kaj en tuta Kosovo indikas altan densecon de log'antaro. Certe tie ne inkluzivig'as c'iuj albanoj (ekz. tiutempe en Leban estis 3000 da ili).
La germana albanologo George von Hahn en sia verko "Albanische Studien" en la jaro 1852 inkluzivas en la etnaj teroj albanaj la kvar vilajetojn ( Janino, Shkoder, Manastir kaj Shkup). Ankau' en la alia verko sia "Reise von Belgrad nach Selanik" eldonita en la jaro 1868 li alportas multajn interesajn donitaj'ojn.

Lau’ la registrig’o de la jaro 1921 rezultig’as ke en eksa jugoslavio log’is en siaj teroj etnaj c’irkau’ 800 000 albanoj . Jen tabelo prezentita de mem jugoslavaj statistikoj.

| Provinco, distrikto | Albanoj | Slavoj kaj aliaj |
|---|---|---|
| Kosovo (Pris’tino, Gilano, Grac’anico, Labi, Ferizaj) | 124 176 | 47 185 |
| Zvec’an (Mitrovico, Vuc’iterno, Drenico) | 50 266 | 21 019 |
| Prizereno ( Prizereno, Gora, Podgora, Radesh) | 77 304 | 27 816 |
| Metohio au’ Ebenaj’o de Dukagjin (Pejo, Gjakovo) | 65 381 | 16 212 |
| Shkup (Komuno plus c’irkau’ajoj) | 15 713<br>24 299 | 22 310<br>29730 |
| Kac’anik | 10 487 | 53 508 |
| Tetovo (komuno) | 70 313 | 53 506 |
| Galic’ik | 5 180 | 8738 |
| Distrikto de Tetovo | 19 335 | 9050 |
| Gostivaro | 33 031 | 14 470 |
| Kumanovo | 4071 | 9207 |
| Distrikto de Kumanovo | 11 757 | 27 943 |
| Prilepo | 17 670 | 19 732 |
| Ohrido | 24 041 | 48 318 |
| Ohrido, komuno | 4317 | 4766 |
| Ohrido distrikto | 225 | 19 330 |
| Dibro | 9011 | 8571 |
| Strugo | 10 480 | 15 651 |

Alia interesa tabelo estas donita de kalendaro de la jaro 1941, eldonita en Sarajevo kie oni atestas pri la albana log’antaro je procentoj.

| Urbo, distrikto | Log’antaro entute | Procento de albanoj |
|---|---|---|
| Roj’ajo | 14 862 | 45 % |
| Manastiro (Bitolje) | 13 252 | 16 % |
| Veles (Koprulu) | 12 939 | 27 % |
| Vuc’iterno ( Vus’trio) | 25 644 | 90 % |
| Gilano | 63 783 | 74 % |
| Gostivaro | 38 786 | 70 % |
| Dibro | 12 995 | 60 % |
| Kac’aniko | 13 124 | 98 % |
| Kerc’ovo | 20 967 | 52 % |
| Mitrovico | 14 173 | 45 % |
| Kumanovo | 21 044 | 16 % |
| Novi Pazar | 38 705 | 66 % kune kun muslimoj de |

| | | Sandj'ako |
|---|---|---|
| Rahoveco | 35 150 | 90 % |
| Ohrido | 5267 | 15 % |
| Pejo | 46 327 | 66 % |
| Plavo | 8753 | 32 % |
| Podgorico | 5412 | 13 % |
| Podujevo | 30 184 | 95 % |
| Pres'evo | 24 048 | 60 % |
| Prizereno | 73 430 | 90 % |
| Prilepo | 15 569 | 16 % |
| Pris'tino | 37 226 | 70 % |
| Resnjo | 5645 | 20 % |
| Senico | 18 893 | 65 % |
| S'kupo | 57 791 | 43 % |
| Drenico | 25 791 | 100 % |
| Tivar (Stari Bar) | 8742 | 49 % |
| Strugo | 15 925 | 51 % |
| Tetovo | 57 310 | 88 % |
| Ulqin | 7497 | 95 % |
| Ferizaj | 29 240 | 80 % |

En la albanaj etnaj teroj en eksa Jugoslavio serboj kaj aliaj slavoj estas infiltritaj nur je malgrana maso c'irkau' 5 %. Tiel ekzemple en haso estis 6377 albanoj kaj nur 2 serboj; en kac'aniko estis 10 487 albanoj kaj nur 233 serboj ka.
Kiel oni povas rimarkebli de la supra tabelo albanoj konsistigis 75-100 % de la tuta log'antaro de Podujevo, Vuc'iterno, Drenico, Gilano kaj Vranja, Pres'evo, Kumanovo, Kac'aniko, Ferizaj, Rahoveco, Suhareko, Prizereno, Tetovo, Gostivaro, Kerc'ovo.

### 3.2.1. **La donitaj'oj hodiau'aj pri albanoj de Kosovo**

En la jaro 1994 estis registritaj 2 175 000 log'antoj au' 200 log'antoj/km² . La kampo de Kosovo havas 600 log'antoj/km². La averag'a ag'o estas 24 jara. Tiaj urboj kiel Ulpiana, Theranda, Siparanti, Municipum DD estas komencinta sian vivon antau' Kristo g'is ili estis anstatau'igitaj de Prishtino, Prizereno, Pejo, Gjakova, Mitrovica, ka.

La translokig'oj komencig'is kun la milito rusa-turka de la jaroj 1876-1878. El la regiono de Prokuplje, Vranja, Leskovc, Nis', albanoj estis forpelitaj el 650 vilag'oj kaj 7 urboj (Prokuplje, Kurshumli, Vranja, Leskovc, Nis', Pirot, Bella Pallanka). Nur el Toplica estis forpelitaj 30 000 personoj skribas serba geografo Cvijic'. Inter la du mondmilitoj estis translokitaj 300 000 albanoj (250 000 al Turkio kaj 50 000 al Albanio). Postmilite, g'is la jaroj 1969, iris al Turkio pliaj 250 000 personoj. Post la jaroj 1970, komencig'is la ekonomia elmigrado en Eu'ropon. Post la jaro 1981 komencig'is kampanjo por amasa mallog'igado. Oni maldungis 130 000 albanojn. En la jaro 1996 estis c'irkau' 340 700 azilpetantoj el Kosovo en Eu'ropo. Je la jaro 1999 estis forpelitaj de la militista –policeska potenco serba 730 000 albanoj (el tiuj 443 300 en Albanion).

La donitaj'oj de antikvaj au'toroj, la lingvistikaj donitaj'oj kaj tiuj arkeologiaj igas konvinka la vidpunkton ke la regiono de Kosovo dum la unua miljaro antau' Kristo konsistigis kulturan kaj etnan unuecon kaj log'atis de la ilira gento de Dardanoj.

### 3.2.2. **Log'lokoj**

Estas entute 1445 el kiuj 30 estas urboj. Tiuj c'i konsistigas 1/3 de la tuta log'antaro.

Prishtina: 250 000 log'antoj, je 585 m super la marnivelo. La arkeologiaj elfosaj'oj en Grac'anica , je proksimeco de g'i, datig'as 6000 jaroj antau' Kristo, dum en Prishtina nur 3000- 2500 jaroj antau'e.

Pejo: c'irkau' 100 000 log'antoj, g'i estas kontinuaj'o de la antikva Siparanto

Prizereno: C'irkauig'as de montovicoj je 2000 m alteco. Oni pensas ke la vivo de la urbo estas komencig'inta kun la pratempa Theranda, centro de iliraj dardanoj, je 6 km apud Prizereno. La nomo de la urbo renkontig'as en XI jarcento kiam sur la monteto de la urbo oni ekstarigis fortreson je defenda karaktero. En la jaro 1019 g'i menciatas kiel episkopejon de la Bizanca Imperio. En la jaro 1570 farig'as centro de la sandj'ako, dum en la jaro 1813 centro de vilajeto. En la jaro 1994 g'i enhavis 80 000 log'antoj.

Gjakova: Starig'as je la alteco 383 m. La ruinaj'oj amlkovritaj en la okcidenta flanko de Ereniko, trans la Ponto de Tabakoj, atestas pri la antikva urbo Gabuleo, el I-IV jarcentoj . La hodiau'a nomo menciatas de vojag'into Evliha C'elebi en la jaro 1662 kiam g'i enhavis 2000 domojn kaj 300 butikojn (artefarejojn). Je la komenco de 1990 jaroj la urbo havis 75 000 log'antoj.

Mitrovica: Altig'as je 508 m. La spuroj de la ruinaj'oj en la vilag'o J'itkovc (Karagac') atestas pri la deveno ekde la tempo de praa neolito. La kontinueco de la ilira etno pruvig'as ankau' per la eltrovitaj'oj apud Sitnico, en Vallas kaj en la bordoj de la rivero Lushe. Kun la konstruo de la fervojo en la jaroj 1873- 1878 Mitrovica akiris impeton en komerco, artefarado, minejoj, log'lokon. Je la komenco de la jaroj 1990 log'antaro atingis 75 000 homojn.

Gilano: estas urbo en la regiono de Anamoravo, fondita dum la dua duono de XVIII jarcento, post kiam la urbo de Novoberdo estis palig'inta. Post la jaro 1878 en g'in eniris amase eifug'intoj el Nis'o, Leskovco, Kus'umlio kaj Vranja. Je la fino de la jaroj 1990 la log'antaro atingis 100 000 personoj.

Ferizaj: Ankau' en Ferizaj-n estis enirintaj amase rifug'intoj el la regionoj de Nis', Prokuplje, Leskovc, Kurs'umlio kaj Vranja. En la jaro 1908, la Granda Kunveno popola kun 20 000 personoj influis notinde en la Dj'onturka Revolucio kaj proklamig'o de Konstitucio.

Kac'anik: trovig'as en la valo de Lepenc, je enirejo de la gorg'o de Kac'anik, liganta Kampon de Kosovo kun la valo de Vardar. G'i estas fondita je la fino de XVI jarcento kiel militistan centron. En la jaro 1910 en la gorg'o de Kac'anik okazis sanguma batalo kontrau' turkojn**.**

**Andi Berberi**

**Humoraj'oj**

- Nikson kaj Brej'njev konkuras bicikle kaj Nikson gajnas. Morgau'on "Pravda" per grandaj literoj informas: "Nia kamarado Brej'njev estis brila la dua kaj Nikson antau'lasta".
- Tony Blair, Vladimir Putin kaj Jacques Chirac kune rigardas pentraj'on kiu prezentas la unuajn homojn, Adam kaj Eva.

Blair: "Rigardu kiel ili estas trankvilaj kaj seriozaj. Ili devis esti angloj.

Chirac: "Ne, vidu, kiel ili estas belaj kaj senhontaj, tiel nudaj. Lau' mi ili devis esti francoj."

- Putin: "Sed tute ne, rigardu bone! Ili ne havas vestaj'ojn, havas nur pomon por mang'i kaj oni diras al ili ke tio estas Edeno ( paradizo). Ili certe estis rusoj".

**(c'erpita el Sennaciulo, au'gusto 2003)**

- En 1905, en la franca urbo Boulogne-sur-Mer, okazis la unua Esperantista Kongreso. Kelkaj urbanoj, precipe knaboj, estis ekscititaj kaj eklernis la Internacian Lingvon.
- Matene L.L.Zamenhov iris al la strato por ac'eti lokan magazinon. Li sin turnis al knabo, kiu vendis j'urnalojn, kaj petis unu ekzempleron-memkompreneble, france. Kiel estis li surprizita, kiam la knabo respondis en la lingvo de Zamenhov: "Parolu Esperante, Sinjoro!"
- En la jaro 1966 vizitis Rusion la tiama gvidanto de UEA, Ivo Lapenna. La kroato Lapenna estis konata oratoro kaj au'toro de 'Retoriko". Do li elokvente parolis nian karan lingvon.

La rusa akompananto interpretis ruse lian E-parolon al studentoj de la Moskva Universitato, kie li mem studis.

En lia enkonduko li diris, ke la estimata gasto naskig'is en Jugoslavio, sed elmigris al Britujo, kie li profesoras c'e Londona Universitato. Post la fino de sia parolado, la gasto respondis demandojn.

"Profesoro, Vi tiom interese parolis pri E-o. Diru almenau' kelkajn vortojn en E-o"

"Tamen, kiun lingvon mi paroladis dum unu horo?"

"La anglan, kompreneble."

"Kaj kian lingvon studas vi?"

" La anglan"

"Do mi gratulas vin okaze de viaj sukcesoj"

Post la lekcio Ivo Lapenna demandis la interpretiston, c'u li parolis E-on kun iu misprononco. La interpretisto atestis, ke lia elparolo estis tute senpeka..

**(C'erpita el Israela Esperantisto" au'gusto 2003)**

-----------------------------------------------------------------------------------

**El nia tradicio**

**La junag'o de Skanderbeg**

Georgo Kastrioti, nomita Skanderbeg, naskig'is en la jaro 1412[2]. Li estis la plej juna filo de princo Johano Kastrioti kaj princino Vojsava. Pri lia nasko la popola fantazio imagis

---

[2] Dokumento trovita de ruslandano Grigorovic' en la monah'ejo de Hilandari evidentigas ke Skanderbeg ne estis ankorau' donita kiel garantiulo al la sultano g'is la lastaj monatoj de la jaro 1421. Sed preskau' c'iuj historiistoj estas konkordaj en la aserto ke li estis donita kiel garantiulo nau' jaroj ag'a , do estas vers'ajne

aron da mirindaj legendoj. Vojsava song'is antau' lia naskig'o, ke s'i naskis drakon, kiu kovris la tutan Albanujon, havis la kapon en la turka limo kaj la voston en Adriatika maro, kaj per sia fau'ko sanga englutadis milojn da turkoj. Georgo, kiam li naskig'is, havis sur la dekstra brako signon de glavo. Apenau' li eliris el la lulilo , li direktig'is al la armiloj de sia patro kaj provis preni arkon, sagojn kaj glavon. Kiam li kreskis, plac'is al li nur ludoj militaj kun liaj fratoj au' aliaj junuloj.
Kiam sultano Murad la Dua forprenis en Adrianopolis la filojn de Johano Kastrioti je garantiaj'o, la gepatroj, la princa kortego kaj tuta popolo de Mati ploris plej multe por la malgranda Georgo, kiu tiam estis nau' jarojn ag'a. La unua ago de la sultano , kontrau' la promeso donita, estis fari la kvar malgrandajn princojn mohametanoj kaj doni al ili nomojn turkajn kaj instruistojn, por ke ili lernu la mohametanan religion. Georgo prenis la nomon Skender Beg, kiu signifas princo Aleksandro.
En la kortego de la sultano Skanderbeg prenis la instruadon de la princoj de la reg'a domo. Li lernis la turkan lingvon, la araban, grekan, slavan kaj italan. La militan arton li lernis el la libroj unue, poste sur batalkampo. Ankorau' malgranda li petadis la sultanon, doni al li premeson partopreni la batalojn, sed la sultano ne permesis tion opiniante lin tro malgranda,. En la uzado de glavo, arko, lanco kaj en la rajdado sur c'evaloj, li estis la plej brava en la reg'a palaco. Homo altkreska kaj belaspekta, kun okuloj viglaj kiel du fajreroj , li estis , lau' samtempulaj atestoj, ang'elo de vira beleco kaj majesteco; c'iu vizag'osigno kaj manmovo, c'iu vorto kaj pas'o de tiu junulo montradis lin reg'a filo kaj homo de grandaj farotaj'oj.
Sultano Murad havis por Skanderbeg specialan simpation kaj ne preterlasis okazon por al li montri g'in. La aliaj fratoj mortis per maniero, kiu lasis konjekti, ke ilia morto ne estis natura. Eble ili estis venenitaj por malaperigi g'enajn heredantojn de la princlando de mati. La sultano indulgis Skanderbeg-on pensante eble, ke li, foririnte el Albanujo tre juna, zorge edukite kaj metode kiel turka princo c'irkau'ite kaj flatite per c'iuj bonoj de la palaco, estas tute turkigita kaj ke ne povos kapti lin nostalgio kaj deziro reveni en mation.
Pro la heroeco , kiun li elmontris en diversaj bataloj, li estis nomita altgrada oficiro, kiam li estis nur dekses jarojn ag'a, kaj du au' tri jarojn poste la sultano elektis lin Sandj'ak Beg , t. e generalo, kaj donis al li komandon de korpuso de 5000 rajdantoj. Li partoprenis diversajn batalojn en Azio kaj Eu'ropo, kaj c'ie honore. Okaze de sieg'o de fortikaj'o en Anatolio, kiel Aleksandro la Granda siatempe en Hindujo , li suriris la muron , kie li starigis la flagon, kaj la unua eniris la urbon. La sultano Murad altigis lian rangon kaj sendis lin kiel komandanton en kelkajn gravajn militojn. Skanderbeg c'iam revenis venkinto kaj kunportis en Adranapolis grandamason da malliberuloj kaj havaj'o. Lia famo plialtig'is tagon post tago; la armeo adoradis lin; la kolegoj havis j'aluzon.
Tiutempe la pulvo ne 'ang'is ankorau' la militan arton. La korpa forto kaj persona kurag'o ludis grandan rolon en batalaj venkoj kaj dueloj dum la milito inter militantoj de malamikaj armeoj kaj dum la paco, estis kutimaj kaj okazis ofte en grandaj urboj. La kurag'ulo prezentis sin c'e iu foiro au' festo kaj invitis al la duelo la plejkurag'ulon de la loko. Okazis, ke meze de publika ceremonio en Adranopolis, giganta tataro prezentis sin

---

ke tiu ne okazis pli malfrue de 1421 t. e. subite post la sieg'o de Belgrado, kiam ankau' Johano Kastrioti estis plene venkita de la sultano. Aliflanke en 1428 ni jam konas Skanderbeg kiel c'efkomandanto de turka armeo, kaj ne estas vers'ajne ke li havis malpli ol dekses jarojn en tiu grado. Tial la plej probabla jaro de lia naskig'o estas la jaro 1412

sur la kampo invitante al duelo kiun ajn el la oficiroj, kiuj c'irkau'is sultanon Murad. Neniu turko movig'is kvankam la sultano promesis grandan rekompenson al tiu, kiu akceptos la tataran inviton. Skanderbeg petis de la sultano permeson batali kontrau' la tataro, kiu jam fanfaronis vidante, ke c'iuj timas lin. Post multaj petoj la sultano donis al li la permeson. La duelo okazis piede sur malgranda loko. Sole la venkinto estus povinta foriri viva. Skanderbeg prezentis sin kaj en iom da tempo etendigis teren la tataron mortigitan. Skanderbeg estis tiam dudekkvin jarojn ag'a.
**(c'erpita el la libro "Skanderbeg-heroo de Albanujo" de Cuk Simoni, eldonita en Shkoder, Albanio em 1929 jaro)**

**<u>Enspezoj-elspezoj g'is 24.09.2003</u>**

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Kotizoj:** | Martha Otto | 1000 L | |
| | Artur Doçi | 500 L | |
| | Enkelejda Doçi | 500 L | |
| | Bardhyl Selimi | 200 L | |
| | Gjergji Gusho | 500 L | |
| | Nehat Sokoli | 200 L | |
| | Shaban Hasani | 1500 L | |
| | Matilda Sokoli | 200 L | |
| | **Entute** | 4600 L | |
| **Elspezoj:** | **Pos'tokostoj** | februare 9 | = 150 L |
| | | marte 1 | =120 L |
| | | Junie 3 | = 240 L |
| | | Maje 25 | = 100 L |
| | | Au'guste 20 | =120 L |
| | | **Entute** | = 730 L |

**Saldo pozitiva** 3870 L

**Noto:** Septembre 2003 estis enkasigitaj favore al nia Instituto, 18 000 L enspezitaj per la vendo de 45 ekzempleroj de REALIZMI I RI ( Nova Realismo) tradukita de s-ro Vasil Pistoli .